



“TIU ĈI REVOLUCIO DONIS OPORTUNON AL NI, INOJ”

Suad Hessen. Kurda politika gvidanto en la siria urbo Aleppo.

Plejmulto el la loĝantaro de la kvartalo Ŝejko Maksud⁽¹⁾ estas kurdoj; depost 2012 ili regas tie per ties aŭtonomaj institucioj. “Vi vidis, ke ĉiu familio havas almenaŭ unu martiron.”

La kvartalo Ŝejko Maksud kuŝas en la nordo de la siria urbo Aleppo. Oni ĝin fondis antaŭ 70 jaroj kaj kvankam plejparto de ties loĝantoj estas kurdoj, ankaŭ vivas tie araboj, asirianoj kaj turkmenoj. Suad Hessen estas prezidanto de la MDS⁽²⁾ en la kvartalo. De pli ol 30 jaroj ŝi aktivas en la movado por liberigo de la kurdoj, kaj ŝia vivo raportas pri la rezistado de la kvartalo. Suad naskiĝis en la kurda urbo Afrino kaj de 40 jaroj ŝi loĝas en Ŝejko Maksud. Dudekkvar-jara, jam edziniĝinta kaj patrino de kvar gefiloj, ŝi konis la PLK⁽³⁾ de la mano de la aktivulo Silan Kobani, kiun kelkajn jarojn poste oni mortigis dum embusko proksime al Mosulo⁽⁴⁾. Danke al Kobani, Hessen konsciis, ke ekzistas popolo, la Kurdoj, kaj ke ĝi estis subpremata. Tuj ŝi ekagis aktive aligante al kurda rezistadmovado en Ŝejko Maksud.

Kion diris via familio, kiam vi ekaktivulis?

Mi engaĝiĝis, kaj tiu alportis al mi multajn malfacilaĵojn. Mia edzo klopodis malhelpi tiom, kiom li povis; li mistraktis kaj insultadis min. Hejme mi ĉion devis lasi preta, sen eraroj, por ke li ne havigu problemojn al mi. Dum jaroj mi vivis duonigita. La familio ankaŭ skoldis: “Vi ne estas viro; vi devus esti normala virino. Virino politikumanta devus morti. Se mi estus via edzo, mi mortigus vin.” Kiel kurda virino mi multon suferis, sed, se ino kredas je si mem, ŝi obstinas, kaj ŝi devas praktiki siajn kredojn. Miaj gefiloj estis je mia flanko, kaj multon mi lernis de ili. Mi pasis la tagon ekstere, sed ili asertis al la patro: “Ne, panjo ne eliris.” Ili estis ege inteligentaj, kaj ekrevoluciis: ili sentis tiel, kiel mi. Ili sciis kiom mi estis luktanta, ankaŭ kontraŭ ilia patro, kaj ili sciis, kiel li suferigis min.

Kiel komencis la revolucio en Ŝejko Maksud?

La meĉo de la revolucio en Ŝejko Maksud ekbruliĝis, kiam oni murdis nian kamaradon Gule Selmo de la virina organizo. Ŝi estis tre simpla virino, analfabeta kaj edziniĝinta, senfila. La 9-an de marto de 2012 la reĝimo atakis Gule Selmo, kaj ŝi mortis kiel martiro la 12-an de marto. Miloj da homoj iris honori Gule Selmo kaj ricevis ŝian korpon. Tiu kadavro estis simbolo de la lukto por la digneco. Tiu murdo fajrigis grandan koleron, kaj Ŝejko Maksud ekbrulis. Ni venĝis la

murdon de nia kamarado: infanoj, virinoj, maljunuloj... Ĉiuj unuiĝis por kapti la kontrolpostenojn, kaj ni liberigis la kvartalon. Post tio, la araboj atakis nin; la ŝtato estis implikita en tiu atako. Niaj martiroj batalis nome de Gule Selmo. Krie ni akceptis niajn martirojn: “Ni ne forlasos la kvartalon!” Tiam, la virinoj pli organiziĝis, kaj ni starigis la virindomojn. Ankaŭ komunumojn kaj konsilantarojn ni organizis.

Kiun sperton vi travivis dum la milito kaj la sieĝo de la kvartalo?

El 2013 la ĝihadistoj alvenis kiel nigra nuboj. Plejmulto el la loĝantoj de Ŝejko Maksud estis el Afrino, kaj multaj tien reiris. Mia filino kaj mi decidis resti: “Dum restos la IPT(5) ankaŭ restos ni.” Ili severe atakis nin, kaj ni respondis sed la premo intensiĝis kaj tuj aperis la provizmanko. Ni estis ĉirkaŭitaj, sen nutraĵo, sen io ajn. Ni splitigis la dompordojn, kaj ankaŭ bruligis la ŝuojn, por ke la defendtaĉmentoj havu ion por varmiĝi. Estis tre malfacile, sed ankaŭ bele, ĉar ni sentis, ke tio estas la revolucio. Ni sentis, ke la revolucio estis transformanta nin.

Kiujn rimedojn vi disponis?

La kuracistoj forlasis nin. Ili diplomiĝis por kuraci la popolon, sed, kiam alvenis la misfortuno ili perfidis ĝian kaŭzon. Komencis alveni vunditoj, sed ili mortis, ĉar ni ne havis medikamentojn nek rimedojn por operaci. Ilin ni komune flegis, sed ni ne sciis kion pli fari. Tio estis terure doloriga. Vidi personon, kiu kuraĝe batalis, kiu agadis por vin defendi, kaj kiu devas morti, ĉar mankas kuracistoj... En la duono de Ŝejko Maksud estas amaso da tomboj. Kiuj ne havis familion aŭ loĝlokon for de Alepo, enterigis surloke siajn familianojn. Ni agis dum la unuaj matenhoroj: la kunuloj fosis truon nokte, sub la bomboj. Ni atendis, kun niaj martiroj volvitaj en plasto, por enterigi ilin matene.

Kiel partoprenis la inoj en la fronto de Ŝejko Maksud?

La 16-a de marto de 2016 estis horora tago. La malamikoj impetege atakis akorde kun la siria ŝtato, kaj ili ĉirkaŭis la kvartalon. Niaj gefiloj unuiĝis al la defendfortoj. Ankaŭ la civiluloj prenis la armilojn. Ĉiuj sentis, ke la defendo estas nia respondeco. La unua ina civiltaĉmento nomiĝis Bataliono Gule Selmo: ili estis 64 anoj.

Kion alfrontis la inoj?

La milito estis sanga. Ni aŭskultis la “Dio grandas!”-proklamadon: “Viajn virinojn ni rabos. Viaj edzinoj kaj filinoj estas *halal*(6) por ni”. La virinoj prenis denove decidon: iri en la fronton kaj batali. Unu el ili, nomita Leyla, havis edzon, filinon kaj filon en la fronto. Ŝi iris paroli kun la kamaradoj: “Se vi ne sendas min al la fronto laŭ oficiala vojo, mi mem trovos vojon. Al mi ne gravas morti.” Snajpero vundis ŝin en la fronto. Ŝia filo, batalinta en Ŝejko Maksud falis poste en Afrino.

Rengin Mezraa ankaŭ estis batalkamarado. Infanetojn ŝi havis, filon kaj filinon. Ŝi diris al la edzo: “Mi ne restos plu sidanta. Ili estas viaj gefiloj, kaj vi devos varti ilin. Mi iras.” Ŝi iris en la fronton, kaj tie la kamaradoj diris al ŝi: “Kamarado, ni kisas viajn manojn, sed, bonvolu reiri hejmen. Ĉagrenas nin vidi vin, infanhavajn inojn, batalantajn”. Mezraa respondis: “Lasu nin decidi! Povus esti, ke neniu el ni pluvivos, sed ni ne permesos al ili konkeri Ŝejko Maksud.”

Ĉu vi havas en la familio inon batalintan?

Mia filino Ranya ankaŭ iris. Ŝi perdis sian edzon kaj havis du infanetojn. Ŝi diris al mi: “Panjo, mi konfidis al vi la infanojn. Mi iras al la fronto.” Mi diris al ŝi: “Ranya, mi ne povas zorgi pri viaj infanoj. Mi havas taskon.” Kaj ŝi respondis: “Ĉu vi scias, kio okazos, se mi ne iras? La malamiko eniros, seksperfortos nin kaj fortranĉos la gorĝon al miaj infanoj. La decido estas prenita.”

Kion faris la inoj, kiuj ne estis en la fronto? Kian rolon ili havis?

Ĉiutage, 150 inoj kuiris manĝon por la fronto. Ili diris: “Niaj gefiloj ne malsatu. Ili havu taŭgan manĝon.” Ili ne manĝis. Ili diris: “Ne gravas, se ni malsatas, sed niaj gefiloj havu manĝon.” Multaj dormis surloke, ne gravis al ili ne reveni hejmen.

Kiam al familio falis martiro, oni ne lasis ĝin sola en la funebro. Malgraŭ la bomboj, ni vizitis nin reciproke. Ni ne povis lasi, ke iu patrino sentu sin sola; ŝi devis scii, ke ni solidaras en la

doloro. Se vi iras al Ŝejko Maksud, vi vidos, ke ĉiu familio havas almenaŭ unu martiron.

Kian rilaton havas la kurdaj kaj la arabaj inoj en Alepo?

Ni havas grandan respekton por la araba popolo, ĉar ni antaŭeniris kune. La arabaj inoj partoprenas, kaj ankaŭ ili prezidas, en la komunumoj, konsilantaroj kaj institucioj. Ankaŭ ili batalas por sia libereco. Ankaŭ ili havas martirojn. Kune ni defendis la kvartalon. Surfronte kune kun ni ili batalis; tre fortas la interpopola solidareco. Ili diras: “Ni ĉiuj estas unu”, “Nia kaŭzo estas unu kaj la sama”, “Ni kune liberigu Sirion”. En Ŝejko Maksud estas libera Sirio. Ni kunvivas kun la sama voĉo kaj je la sama doloro.

Kion vi opinias pri via aktiveco? Kion vi lernis?

Mi estas kurda virino batalanta de 30 jaroj, kaj mi ĉiam demandas al mi, ĉu tio, kion mi faras kaj lernas, sufiĉas por niaj kamaradoj kaj martiroj. Tiu ĉi revolucio donis oportunon al ni, inoj; eble ne estas la sama afero por la viroj. Ĝi estas por la inoj, por plibonigi la staton de la kurdaj inoj, por plibonigi la staton de la mezorientaj inoj, kiuj estas tute subpremitaj. Ni, la kurdoj, ekpaŝis unue. Malfacilaĵoj kaj obstakloj jam ne haltigos nin. Se vi fidas je vi mem, vi kapablas fari ion ajn. Se la inoj volas, ne ekzistas problemoj nesolveblaj.

Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Ŝêxmeqsûd.
- (2) Movado por Demokrata Socio (MDS)/Tevgera Civaka Demokratik (TEV-DEM).
- (3) Partio de la Laboristoj de Kurdo (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (4) Mûsil.
- (5) Inaj Protekt-Taĉmentoj (Yekîneyên Parastina Jinê).
- (6) Per tiu ĉi vorto la ŝario (islama leĝaro) pravigas agon. En tiu kazo ĝi signifas, ke la virinoj kaptitaj estos konsiderataj milita predo kaj libere disponeblaj por la kaptintoj.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: Sara Ainhoa de Ceano-Vivas Nuñez.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 28-an de Marto 2019-a.

Tradukis: NXC. Aŭgusto 2019-a. Provlegis: DS.

